# *Tago de la edukisto en Kubo: planti lernejojn*




Havano, dec 22 (RHK) Kubo festas hodia? la Tagon de la edukisto kaj memorigas la fermon de la kampanjo alfabetiga, kiu en 1961 transformis la insulon en la unua teritorio libera je analfabeteco en Latinameriko.

La? oficialaj  esploroj, pli ol 100 mil gestudentoj estis kunvokitaj de la kuba gvidanto Fidel Castro por la alfabetiga movado komenci?inta la unuan de januaro de tiu sama jaro.

Kun lampoj ?e-mane,  la studentoj eliris el siaj urbaj domoj kaj trairis la plej forajn angulojn de la tuta lando por alfabetigi kamparanojn, laboristojn, virinojn, infanojn kaj dividis kun ili ?iuj sian instruon.

La 22-an de decembro de tiu jaro, Fidel deklaris la kampanjon sukcese finita kaj de tiam kreskis la nobla sento eduki kaj klerigi.

Hodia?, ?is la fermo de 2019-2020, la nacia oficejo de statistiko raportis ke estas en la kubaj klaso?ambroj 245 061 geinstruistoj en diversaj specoj da instruado.

La kuba ministrino pri edukado, doktorino Ena Elsa Velázquez Cobiella, partoprenis ceremonion por distingi elstarajn instruistojn de diversaj fakoj.

?i asertis ke tiu ?i jaro “estis intensa, de sinofero kaj decidaj klopodoj, e? meze de la kompleksa situacio travivata de la mondo kaj nia lando, pro la pandemio.”

Tiu ?i estas la forto de la kuba Revolucio, popolo klera kaj instruita.

Kiel asertis Fidel siatempe: “Revolucio klerigas, batalas kontra? nescio kaj malklereco, ?ar en la nescio kaj malklereco estas la pilieroj sur kiuj bazi?as la konstrua?o de la mensogo, la mizero, la konstrua?o de ekspluatado.”

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/242773-tago-de-la-edukisto-en-kubo-planti-lernejojn

**Radio Habana Cuba**